

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Michael Farris
Ronald Glossop
Gong Xiaofeng (Arko)
Mireille Grosjean
Jung Yuro (Unika)
Ilona Koutny
Katalin Kováts
Rob Moerbeek
József Németh
Gražina Opulskienė
Fabrizio A. Pennacchiotti
Radojica Petrović
Germain Pirlot
Philippe Planchon
Svetlana Pogorelaja
Bruno Robbes
Ida Stria



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Philippe PLANCHON: <i>Tipologiaj demandoj kaj perspektivoj [...]</i>	4
Gražina OPULSKIENĖ: „ <i>Kariero</i> ” <i>pere de Esperanto</i>	14
Ĉu la parolo de la instruistoj ankoraŭ aŭtoritatas? (Bruno ROBBES)	17
Svetlana POGORELAJA: <i>Aldoni ĝojon al la vivo – danke al EO [...]</i>	21
<i>Szabolcs SZILVA: Pri kio temas?</i> (recenzo de Rob MOERBEEK).....	24
El la landoj kaj sekcioj (CN, HU, IT, PL)	26
La 54-a ILEI-Kongreso en Kotonuo – informoj (JUNG Yuro, Unika).....	31
ILEI-Simpoziaj informoj (Radojica PETROVIĆ).....	33
Anoncoj	35
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Rue du Chapeau-Râblé 52, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

Vicprezidanto: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.

Estrarano pri financaj aferoj: William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Vic-prizorganto de financaj aferoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>

Estrarano: JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Universitata agado, Eŭropa komisiono de UEA, AEDE. Simpozio 2021.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford;

AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE¹

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Philippe PLANCHON (vd. lian ĉefartikolon sur p. 4)

Sur la dorsovriloj: Nova studgrupo pri Interlingvistiko startos en septembro en Poznano, Pollando (vd p. 29)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Ne facilas skribi hodiaŭ pri la vivo kaj agado de ILEI. Ni preparas nian Kongreson, tamen ni ankoraŭ ne scias, ĉu fizika renkontiĝo en Kotonuo povos okazi. La decido venos komence de junio. Ĉiumaniere ni estos kune de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto almenaŭ rete, tio certas. Ni planas novajn agadojn, tamen ni ne scias, kiu Estraro gvidos la Ligon post la Kongreso. Fakto estas, ke elektoj okazos kadre de nia Kongreso.

Mi ne estos kandidato por la prezidanteco. Kiam mi pripensas pri miaj faritaĵoj, mi vidas longan liston de ne konkretigitaj agadoj; mi povas mem fari severan raporton pri miaj ok jaroj en tiu ofico.

Ni ĉiuj devas trovi ekvilibron inter nia profesia vivo, nia familia vivo kaj nia volontula laboro por la Ligo; en tiu kampo mi devas pardonpeti pri mia minimuma laboro por la Ligo ekde februaro pro katastrofa incendio de mia domo kaj devigata rapida translokiĝo.

Sed venos bela vetero post fulmotondro, venos tago post nokto. Venos nova Estraro kun novaj ideoj kaj novaj fortoj. Ni klopodu, ke venu novaj membroj, novaj agadoj, ke kresku niaj sekcioj, ke firmiĝu nia ekzisto en la eduka mondo. Ni riĉiĝu per legado de tiu ĉi nova kaj interesa numero de IPR. Mi deziras al vi bonan legadon.

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

Tipologiaj demandoj kaj perspektivoj rilate al la konstruitaj lingvoj

de Philippe PLANCHON (Francio)

Resumo. Kiel karakterizi la konstruitajn lingvojn laŭ tipologia vidpunkto? Necesas distingi inter lingvistikaj kriterioj, kiuj rilatas al la strukturoj de la lingvoj, kaj sociolingvistikaj kriterioj, kiuj rilatas al la sociaj kondiĉoj de uzo de la lingvoj. La kategorio de la konstruitaj lingvoj plu estas fonto de malfacilaĵoj, tiel ke jam de longe ŝajnis oportune ellabori apartajn kriteriojn por interlingvistiko. Tamen, estas necese pravigi la elekton de tiaj kriterioj kaj denove distingi inter lingvaj kaj sociaj aspektoj. Ni proponos plurajn manierojn artikigi tiujn kriteriojn. Tio estas aparte grava por Esperanto, sed ankaŭ por klarigi la propraĵojn de aliaj konstruitaj lingvoj kaj por prilumi la plej ĝeneralajn propraĵojn de la homaj lingvoj.

Ŝlosilvortoj: tipologiaj kriterioj; interlingvistiko; sociolingvistiko; konversaciaj skemoj.

1 Diverseco de la tipologiaj kriterioj

La nombro de konstruitaj lingvoj superas mil kaj plu kreskas. Pro tiu multnombro, tipologia vidpunkto ja taŭgas. Tipologio klarigas la diversecon de la lingvoj uzante specifajn kriteriojn por distingi lingvo-tipojn. Sed la elekto de la kriterioj ne estas simpla afero. Kiel distingi inter la konstruitaj lingvoj? Kiaj kriterioj ebligas distingi inter la konstruitaj lingvoj kaj la etnaj lingvoj? Ĉu la kriterioj devas esti propraj al la konstruitaj lingvoj?

Oni povas distingi du tipojn de variado inter la lingvoj. Unuflanke, la variado, kiu rilatas al la parolantoj kaj al la uzo de la lingvo dependas de la socia aspekto de la lingvo, kaj tion studas sociolingvistiko. Aliflanke, la propraĵoj difinitaj en la normo mem de la lingvo rilatas al la lingvistika aspekto (ekzemple la leksiko, la sintakso, la fonologio ktp).

Sed ĉu ne utilis ankaŭ pristudi la konstruitajn lingvojn per aparta metodo, t.e. interlingvistika aliro¹? Jam estis provoj konstrui interlingvistikajn tipologiojn. Bedaŭrinde, ili ofte miksas lingvajn kaj sociajn kriteriojn. Sed ili ebligas pli da distingo inter la konstruitaj lingvoj ol la ĝeneralaj tipologioj ebligas (ekzemple, la diskutado pri la natureco² ebligas distigon inter

¹ Unua provo tiudirekte estis tiu de Gaston Moch en 1897.

² Lyons (1991), Gobbo (2012), Stria (2015).

diversaj tipoj de konstruitaj lingvoj). Tiukampe, granda laboro estis farita por recenzi kaj pristudi la konstruitajn lingvojn³, sed gravas pridemandi la kriteriojn uzindajn.

Pro tio, oni povas konstrui iun „tipologion de la tipologioj”. Ni jam aludis du distingojn. Unue, tipologio povas baziĝi sur lingvaj propraĵoj (**lingvistikaj tipologioj**) aŭ sur sociaj propraĵoj (**sociolingvistikaj tipologioj**). Due, tipologio povas aplikiĝi al ĉiuj lingvoj (**ĝeneralaj tipologioj**), aŭ specife al la konstruitaj lingvoj (**interlingvistikaj tipologioj**). Se oni krucigas tiujn du distingojn, oni povas distingi kvar kazojn, kiel montras la tabelo 1.

Tabelo 1 – Diversaj aliroj al tipologioj

	<i>Lingvistikaj tipologioj</i>	<i>Sociolingvistikaj tipologioj</i>
<i>Ĝeneralaj tipologioj</i>	Laŭ lingvaj analiz-niveleoj	Lingvo-varioj (cf. Stewart)
<i>Interlingvistikaj tipologioj</i>	Laŭ propraĵoj de la lingvoj	Laŭ celoj kaj uz-kondiĉoj

2 Lingvistikaj tipologioj

2.1 Ĝeneralaj lingvaj kriterioj

La unua speco de klasifikado estas tiu de la historia kaj kompara lingvistiko. Tiu strategio malfacile aplikiĝas al la konstruitaj lingvoj⁴. Certe, povas ekzisti iusence familioj de konstruitaj lingvoj, tiel ke oni fojfoje parolas pri idoj se temas pri reformoj de lingvoprojektoj, ekzemple parolante pri esperantidoj aŭ volapukidoj (Monnerot-Dumaine, 1960). Sed la rilatoj inter tiuj lingvoprojektoj ne sekvas la regulojn de evoluado samkiel en la etnaj lingvoj.

Aliflanke, planlingvoj povas aspekti kiel membroj de jam konataj lingvofamilioj: *Slovianski* iel parenas al slavaj lingvoj, *Tutonish* parenas al ĝermanaj lingvoj, *Interlingua* al latinidaj lingvoj. Tiuj komparoj estas

³ Vd. interalie Eco (1996), Duliĉenko (1990), Okrent (2010), Albani & Buonarrotti (2001).

⁴ Vd. tamen Brosch (2008) por provo de apliko de la hindeŭropaj nocioj al la sistemo de Esperanto.

diskuteblaj, ĉar ili baziĝas sur la leksiko, sen atento pri la fonetika evoluo. Tial paroli pri parenceco estas misuzo, en la kadro de historia lingvistiko.

La dua speco de klasifikado ebligas kunligi lingvojn, kiuj tute ne estas parencaj laŭ geneologia vidpunkto. Povas do temi pri proksimeco aŭ simileco de la leksikoj, tiel ke laŭ leksikologia vidpunkto, *Interlingua* kaj la latinidaj lingvoj ja estas proksimaj lingvoj.

La klasifiko povas okazi ankaŭ sur la fonologia kampo. Ekzemple, la lingvoj similas aŭ malsimilas laŭ la nombro de fonemoj. Tiu nombro estas tre malgranda en lingvo kiel *Toki Pona* (14 fonemoj), sed tre granda en *Ithkuil* (45 konsonantoj, 13 vokaloj, 12 diftongoj). Aliflanke, la nombro de la fonemoj en Esperanto estas ordinara kompare kun la etnaj lingvoj⁵.

La silaba strukturo povas esti alia kriterio. Ekzistas etnaj lingvoj, kiuj uzas regulan strukturon laŭ la tipo Konsonanto-Vokalo (japana, indonezia, malagasa), dum aliaj lingvoj uzas strukturon KVK, kaj aliaj ebligas eĉ pli malsimplajn strukturojn (Blevins, 1995). Ankaŭ la konstruitaj lingvoj povas esti konsiderataj laŭ tiu aspekto. Ekzemple, *Tunu* estas lingvo kun silabstrukturo KVKV. Aliflanke, lingvo kiel *Volapük* estas lingvo kun silabstrukturo KVK. Ni povas ankaŭ konsideri la sintaksan strukturon. Ekzemple, la baza vortordo (inter verbo, subjekto kaj objekto) ebligas distingi diversajn lingvo-tipojn⁶, laŭ la tabelo 2:

Tabelo 2 – Baza vort-ordo laŭ la lingvoj

ORDO	Ekzemploj de etnaj lingvoj	Ekzemploj de konstruitaj lingvoj	Ekz-oj en Esperanto (www.tekstaro.com) ➔ Eo estas lingvo kun relative libera vortordo
SOV	japana, eŭska	Atlantean	<i>li min ekrigardis</i>
SVO	franca, rusa, ĉina	Toki Pona	<i>Ĉu vi ne amas min pli ol ĉiun?</i>
VSO	irlanda, hebrea	Laadan	<i>haladzigas vi min per la efemeroj</i>
VOS	malagasa, fiĝia	Nyo'fa	<i>Jen tedis min la migrado</i>
OVS	apalai, tamila	Klingon	<i>Min punos Dio kaj la konscienco</i>
OSV	warao, xavante	Yulasa	<i>Ke vin kaj min li baldaŭ povos savi</i>

⁵ Pluraj aŭtoroj substrekis tiun mezan pozicion laŭ la kriterioj de la lingvistikaj tipologioj, ne nur fonologie, sed ankaŭ sintakse kaj morfologie. Por diskuto pri tiu temo, vidu Parkvall (2010), Koutny (2015).

⁶ En kelkaj lingvoj (kiel Esperanto kaj la latina lingvo), la vortordo povas esti pli-malpli libera.

Ankaŭ la morfologio povas multe varii. Oni tradicie distingas inter izolaj, aglutinaj kaj fleksiaj lingvoj. Ankaŭ tiu ĉi distingo povas aplikigi kaj al la etnaj lingvoj, kaj al la konstruitaj lingvoj. Jen kelkaj ekzemploj:⁷ la itala kaj *Occidental* estas fleksiaj (fandaj) lingvoj; la ĉina kaj *Glosa* estas izolaj lingvoj; la turka kaj *Ygyde* estas aglutinaj lingvoj.

Ĉiukaze, ni konstatas ke la konstruitaj lingvoj prezentas klaran diversecon. La konstruitaj lingvoj estas pli-malpli similaj al la etnaj lingvoj, foje tre similaj, foje tre malsimilaj, kaj foje prezentas apartaĵojn. Tio certe malfaciligas ilian klasifikadon, ĉar la konstruitaj lingvoj ne funkcias kiel homogena lingvo-tipo en tiuj lingvistikaj tipologioj.

2.2 Interlingvistikaj lingvaj kriterioj

La interlingvistika tipologio ebligas pliajn distingojn, kiuj klarigas apartaĵojn de la konstruitaj lingvoj. La plej konataj estas la distingo inter pazigrafioj kaj pazilalioj; la distingo inter skemismo kaj naturalismo (laŭ la grado de reguleco kaj fideleco al la modelo de la etnaj lingvoj)⁸; kaj la distingo inter aprioraj kaj aposterioraj lingvoj (laŭ la formado de la radikoj).

Ni povas aldoni kelkajn precizigojn pri tiu ĉi lasta distingo. Ĝi rilatas al la formado de la radikoj, per kombinado de fonemoj. Tiu formado povas okazi per prunto de radikoj el etnaj lingvoj (**aposterioraj lingvoj**) aŭ sendepende de iu ajn etna lingvo (**aprioraj lingvoj**).

Ĉe la aprioraj lingvoj, estas pluraj manieroj por elekti la formojn: arbitre elekti sonojn (*hazarda elekto*); utiligi hipotezon pri rilatoj inter sonoj kaj ideoj (*ideofonaj*); interpreti nombron en vortolisto (*poligrafioj*); uzi sisteman klafisikadon (*filozofiaj lingvoj*).

Ankaŭ ĉe la aposterioraj lingvoj, estas pluraj manieroj por elekti la formojn laŭ la fontoj: ununura lingvo kiel fonto (*reformo*); komuna formo inter parencaj lingvoj (*zona lingvo*); heterogena prunto el la plej diversaj lingvoj (*eklektismo*); prunto-strategioj (kun la celo krei homogenan radikaron, per adaptoj al internaj principoj de la konstruita lingvo).

⁷ Esperanto estas denove en meza pozicio: ĝi similas al fleksia lingvo (pro finaĵoj), al aglutina lingvo (kombino de morfemoj), kaj al izola lingvo (nevarieco de la morfemoj). Mankas la vokala harmonio de la aglutinaj lingvoj, kaj la variigo de la radikoj de la fleksiaj lingvoj. Tial Piron (1994) argumentis pri la izola trajto de Esperanto.

⁸ Vd. Couturat & Leau (1903).

La tabelo 3 prezentas sintezon de tiuj metodoj, kun ekzemploj de konstruitaj lingvoj:

Tabelo 3 – Diverseco de la metodoj por la formado de la radikoj

<i>aprioraj lingvoj</i>	ekzemploj	<i>aposterioraj lingvoj</i>	ekzemploj
hazarda elekto	<i>Kotava</i>	reforma projekto	<i>Latino sine flexione</i>
ideofona principo	<i>Blaia Zimondal</i>	zona lingvo	<i>Medžuslovjansky</i>
poligrafia metodo	<i>Universal Character</i>	heterogenaj fontoj	<i>Sambahsa</i>
klasifika strategio	<i>Dalgarno; Wilkins</i>	prunto-strategioj	<i>Volapük; Esperanto</i>

3 Sociolingvistikaj tipologioj

3.1 Ĝeneralaj sociaj kriterioj

Lingvo konsistas ne nur el reguloj, radikoj, morfemoj kaj fonemoj. Lingvo estas kodo, danke al kiu homoj parolas en difinitaj sociaj kondiĉoj. En tiu ĉi kadro, ne ĉiuj lingvoj ricevas saman atenton kaj agnoskon, kaj ĉiu lingvo devas adaptiĝi laŭ siaj propraj sociaj kondiĉoj.

Estas diversaj klasifikadoj de la lingvoj laŭ la sociolingvistika vidpunkto. Inter tiuj tipologioj, mi uzos tiun de Stewart (tabelo 4). Ĝi estas iom malnova, sed havas la avantaĝon baziĝi sur opoziciaj trajtoj, tiel faciligante la diskutadon. Ni interesiĝos pri la kriterioj (1) ĝis (4), kiuj pure rilatas al la sociaj aspektoj⁹ (dum la aliaj kriterioj estas pli lingvaj ol sociaj).

Tabelo 4 – Sociolingvistika tipologio de Stewart (1968), laŭ Gueunier (1995)

Variecoj	(1) memstareco	(2) viveco	(3) historieco	(4) normigo	(5) funkcioj	(6) miksoj	(7) reduktioj	(8) analizeco	ekzemploj
norm-lingvoj	+	+	+	+	ĉiuj	-- / +	-	-	franca, malagasa ktp.
nenormigaj lingvoj	+	+	+ / -	-	(a)	-- / +	-	-	popola franca, "nigra" angla, maroka

⁹ *memstareco*: sendependa ekzisto de la lingvo; *viveco*: ekzisto kaj grandeco de la parolantaro; *historieco*: konscio de la uzoj de la komunumo tra la tempo; *normigo*: skrib sistemo, gramatiko, publikigo de vortaroj.

dialektoj	-	+ / -	+ / -	-	ne ĉiuj	- / +	-	-	valona, gaskona
piĝinoj	-	-	-	-	(b)	+	+	+	Kameruna Pidgin English,
kreoloj	- / +	+	- / +	- / +	ne ĉiuj	- / +	- / +	+ / -	antil-kreolo, jamajla, maŭrcia, Kriol
pontlingvoj	+ / -	- / +	-	-	ne ĉiuj	+ / -	+ / -	+ / -	ĉada araba lingvo
kojneoj	+ / -	+ / -	- / +	- / +	ĉiuj	- - / +	-	-	kojneja greka, svahila
klasikaj lingvoj	+	-	+	+	(c)	-	-	-	sanskrita, latina
artefaritaj lingvoj	-	-	-	+	ne ĉiuj	+	+	+	Esperanto

(a) preskaŭ ĉiuj; (b) rudimentaj funkcioj; (c) klera kulturo; - / + trajto ekaperas; + / - trajto malaperas; - - / + trajto kun minimuma ekzisto

Tiu tipologio pritraktas ankaŭ la kategorion de "artefaritaj lingvoj", menciante Esperanton. La elekto de tiu ekzemplo estas memevidenta, sed misgvida: Esperanto ekzistas laŭ sociaj kondiĉoj, kiuj tute ne estas la samaj por plejmulto de la konstruitaj lingvoj. Fakte, la kriterioj estas subtaksataj por Esperanto, kiu ja estas memstara, viveca kaj historia fenomeno. Sed, se oni uzas plusojn por tiuj tri kriterioj, oni alproksimigas Esperanton al la normlingvoj, kaj ne plu eblas distingi inter tiuj kategorioj. Kiel solvi tiun problemon? Estas ĉi tie kvar ebloj.

1) Oni povas forkonsenti, ke la kriterioj estas malpli validaj por Esperanto ol por aliaj lingvoj. Anstataŭ plusojn, oni uzu ĉi tie mikson de plusoj kaj minusoj. Tiu solvo estas nuanca, sed ĝi denove kondukas al manko de distingeco, ĉar Esperanto nun identiĝas al la kojneoj.

2) Pli interesa solvo estas la aldono de nova kriterio, ekzemple laŭ la deveno mem de la lingvo: ĉu ĝi komenciĝis per publikigo de la normo, aŭ ĉu ĝi devenas de iu pralingvo? Bedaŭrinde, tiu kriterio distingas nur inter la "artefaritaj lingvoj" kaj la lingvoj de aliaj tipoj.

3) Alia proponenda kriterio estus la grado de spontaneco aŭ intenca interveno en la produkto kaj evoluo de la lingvo. Tiu kriterio povus esti utila eĉ por distingi inter aliaj lingvotipoj. Bedaŭrinde, tiu kriterio estas tro malpreciza, ĉar ĉiu lingvotipo entenas iun gradon de spontaneco kaj iun gradon de intenca interveno. La afero estas do malfacile mezurebla.

4) Mia lasta propono estas aldoni kriterion, kiu ne rilatu al iu intenca deveno, sed al la geografia konsisto de la parolantaro: kie estas la parolantoj de la lingvo? Ĉu kunigitaj en sama loko (–) aŭ disigitaj diversloke (+)? Tia

kriterio povas efiki ĝenerale, kaj taŭgas por priskribi aliajn lingvotipojn¹⁰. Plie, tiu kriterio solvas alian problemon, nome la neceson distingi inter diversaj tipoj de konstruitaj lingvoj: lingvoprojektoj malmulte parolataj estos karakterizataj de kunigiteco (–), dum planlingvoj (kiel Esperanto) estos karakterizataj de disigeco (+)¹¹.

Tiuj proponoj de modifado montras ĉiukaze, ke la konstruitaj lingvoj konsistigas kompleksan kategorion, kun specifaj trajtoj. Tiel, ke oni bezonas ankaŭ sociolingvistikan tipologion, kiu interesiĝu pli specife pri la konstruitaj lingvoj, do pri interlingvistiko.

3.2 *Interlingvistikaj sociaj kriterioj*

En tiu perspektivo, oni unue povas konsideri la plivastiĝon kaj ensociiĝon de la lingvoprojektoj ĝis la stato de plene funkcia planlingvo kiel Esperanto¹². Tiun tipologion prezentas Detlev Blanke (1985) laŭ 18-ŝtupa skalo (poste pligrandigita al 28-ŝtupa skalo).

Tio estas nur unu aspekto de la problemo, nome la vasteco de uzado. Konstruitaj lingvoj povas esti pli-malpli uzataj, kaj tamen esti malsamaj se oni konsideras la sociajn kondiĉojn, kiujn ili celas. Lingvo povas esti konstruata cele de internacia komunikado, sed ĝi povas esti konstruata por aliaj celoj, ekzemple por literaturaj aŭ kinartaj celoj, religiaj aŭ magiaj celoj, eksperimentaj celoj, ĉifradaj celoj, ludaj aŭ personaj celoj kaj tiel plu.

Estas interesaj provoj prezenti kompletan bildon de tiuj subkategorioj de konstruitaj lingvoj. Ida Stria (2015) tiel pridiskutas la tipologion de Albani & Buonarotti (2001), kaj la uzon de la t.n. *Gnoli-triangulo*. Bedaŭrinde, por distingi la subkategoriojn, oni bezonas uzi sociajn kaj kulturajn distingojn (ekzemple inter arto, scienco, religio, magio, ludo ktp.), kiuj tute ne rilatas al la lingvoj mem, kaj tio certe estas problemo por sociolingvistikaj tipologioj.

Por solvi tiun problemon, mi proponas uzi konversaciajn modelojn, kiujn ekzemple uzis Lilli Papaloïzos (1992) por enkonduki funkciisman prezenton

¹⁰ Ekzemple, la trajto *disigeco* fariĝas pozitiva por pontlingvoj (inkluzive de naciaj lingvoj uzataj internaciskale), por lingvoj de diasporoj, por kojneoj k.a.; kaj la trajto *disigeco* estas negativa ekzemple por dialektoj.

¹¹ Kompreneble, la grado de disigeco ĉi tie dependos ankaŭ de la nombro de parolantoj: ju pli da parolantoj estos, des pli vasta povos esti la reto de la parolantoj, kaj des pli bone aplikiĝos tiu kriterio rilate al disigeco.

¹² Pri tiu ĉi demando, vidu ankaŭ Věra Barandovská-Frank (1995).

de la E-komunumo laŭ etnografia metodologio. Tiu konversacia modelo estas interesa por klarigi situaciojn, kie pluraj parolantoj interagis, sed oni ja povas ĝeneraligi tiun modelon por tipologiaj celoj. La tabelo 5 montras kombinojn de konversaciaj skemoj laŭ diversaj tipoj de konstruitaj lingvoj¹³.

La analizo estas aplikata al situacio, kie du homoj interparolas: Parolanto 1 (P¹) parolas al Parolanto 2 (P²), kun eventuala observanto de la interŝanĝo (P³). Sed kiun lingvon ili scipovas kaj uzas? Povas esti etnaj lingvoj (notitaj per minuskloj: a, b, c...) aŭ konstruita lingvo (X). La gepatra lingvo estas Lingvo 1 (L1), kaj la akirita aŭ lernita lingvo estas Lingvo 2 (L2).

Tabelo 5 – Tipologio bazita sur modelo de konversaciaj skemoj

Personaj lingvoj	P ¹	P ²
L1	a	a
L2	X	

Kaŝlingvoj	P ¹	P ²	P ³
L1	a	a	a
L2	X	X	

Fikciaj lingvoj	P ¹	P ²
L1	X	X
L2		

Inĝenieraj lingvoj	P ¹	P ²	P ³
L1	X	X	a
L2			X

Program-lingvoj	P ¹	P ²
L1	X	a
L2		X

Spiritismaj lingvoj	P ¹	P ²	P ³
L1	X	a	a
L2		X	

Helplingvoj	P ¹	P ²
L1	a	b
L2	X	X

Pentekosta lingvo	P ¹	P ²	P ³
L1	a	b	X
L2	X	X	

¹³ Jen kelkaj ekzemploj de lingvoj por tiuj lingvotipoj. Personaj lingvoj: la lingvo *Whammo* (de la artisto Öyvind Fahlström); Fikciaj lingvoj: *Na'vi* (de Paul Frommer, uzata en la filmo *Avatar*); Program-lingvoj: Basic, Python; Helplingvoj: *Esperanto*, *Volapük...*; Kaŝlingvoj: la lingvo de la ĝemelinoj Gibbons (Wallace, 1998); Inĝenieraj lingvoj: *Láadan* (de Suzette Haden Elgin); Spiritismaj lingvoj: la marsana lingvo de Helen Smith (Cifali, 1988); Pentekosta lingvo: temas pri spontanaj produktoj, sen oficiala normigo / Vd. Yaguello (2006).

Koncerne la **personajn lingvojn**, notindas ke P¹ kreas la lingvon kiel artan verkon, kaj nur P¹ komprenas ĝin. Certe, la lingvo povas plaĉi al P², sed P² ne komprenas ĝin. Estas alie ĉe la **fikciaj lingvoj**: ili celas kredigi pri la ekzisto de denaskaj parolantoj (kvankam tute fikciaj), tiel ke la spektanto imagas ĉeesti aŭtentan interŝanĝon inter ili. Ankaŭ la **program-lingvoj** supozas specialajn parolantojn. La informadika sistemo funkcias ĉi tie kiel P¹: ĝi scipovas nur lingvon X, kaj P² estas la programisto, kiu scipovas la programlingvon kaj sian etnan gepatran lingvon. Aliflanke, la **helplingvoj** necesigas enkonduki almenaŭ du etnajn lingvojn (a & b), kaj la helplingvo funkcias plej ofte kiel dua lingvo inter la parolantoj¹⁴.

La **kaŝlingvoj** laŭ-difine ne estas komprenataj de la observanto (P³), kiu ĉeestas la interŝanĝon. P¹ kaj P² uzas la kaŝlingvon, eĉ se ili ankaŭ scipovas komunan gepatran lingvon. La **inĝenieraj lingvoj** celas elprovi specifajn lingvistikajn hipotezojn, sed por serioze testi hipotezon, la parolantoj ideale devus uzi la lingvon kiel ekskluzivan denaskan lingvon, dum la lingvisto (P³) observus ilian konduton. La **spiritismaj lingvoj** baziĝas sur la supozo, ke iu persono (P²) estas interpretisto de iu ne-fikcia estaĵo (spirito aŭ eksterterano), kiu mem scipovas nur X kaj tiel efikas kiel *mediumo* inter la estaĵo kaj la observanto. **Pentekosta lingvo** estas elparolata lingvo (senkonscie konstruata), kiun la interparolantoj (se ili firme kredas je la miraklo) ŝajne komprenas, kaj kiun komprenas evidente ankaŭ la sankta spirito (P³), se tiu ĉi ekzistas.

Kompreneble, necesus plibonigi tiun modelon, esplori la rilatojn inter la kategorioj kaj konfronti ĝin al pli multe da ekzemploj de konstruitaj lingvoj, uzataj en la plej diversaj situacioj. Tamen, tiu aliro al la tipologiaj demandoj per konversaciaj skemoj povas helpi pli bone kompreni la apartan pozicion de la konstruitaj lingvoj en la ĝenerala sociolingvistika tipologio, kaj ankaŭ por klarigi iliajn apartajn lingvajn propraĵojn laŭ la celata situacio. Per tiu metodo, oni espereble povos fine uzi tiujn diversajn specojn de tipologioj, kriterioj kaj subkategorioj por klarigi la principojn, kiujn oni esploras en interlingvistiko.

Referencoj

Paolo ALBANI; Berlinghiero BUONARROTI (2001). *Dictionnaire des langues imaginaires 'Vortaro de la imagaj lingvoj'*. Parizo: Belles Lettres.

¹⁴ Tio eĉ veras ankaŭ por E-denaskuloj, ĉar ĉiu el ili havas almenaŭ alian gepatran lingvon. Estas ankaŭ notinde, ke povas esti aliaj situacioj por uzo de Esperanto (kaj ĝuste pro tio aperas i.a. la demando pri *krokodilado*).

Věra BARANOVSKÁ-FRANK (1995). *Enkonduka lernolibro de interlingvistiko*. Sibiu: Editura Universităţii.

Detlev BLANKE (1985). *Internationale Plansprachen: eine Einführung 'Internaciaj planlingvoj: Enkonduko'*. Sammlung Akademie-Verlag Sprache 34. Berlin: Akademie-Verlag.

Juliette BLEVINS (1995). *The Syllable in Phonological Theory 'La silabo en la fonologia teorio'*. En: J. Goldsmith (eld), *The Handbook of Phonological Theory 'La manlibro de la fonologia teorio'*. Oxford: Blackwell.

Cyril BROSCHE (2008). *Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio*. Diplomalaboraĵo. Universitato Adam Mickiewicz.

Mireille CIFALI (1988). La fabrication du martien: genèse d'une langue imaginaire '*La fabrikado de la marsa: origino de imaga lingvo*'. *Langages*, n-ro 91, p. 39-60.

Louis COUTURAT; Léopold LEAU (1903). *Histoire de la langue universelle 'Historio de la universala lingvo'*. Parizo: Hachette.

Aleksandr Dmitrievič DULIČENKO (1990). *Международные вспомогательные языки 'Internaciaj Helpaj lingvoj'*, Tallinn: Valgus.

Umberto ECO (1996). *La serĉado de la perfekta lingvo*. Trad. Daniele Mistretta, Pisa: Edistudio.

Federico GOBBO (2012). Alan Turing creator of Artificial Languages / Alan Turing kreinto de Artefaritaj Lingvoj. *InKoj*, n-ro 3(2), p. 181-194.

Nicole GUEUNIER (1995). Les contacts de langues dans les situations de la francophonie '*La kontaktoj inter lingvoj en la situacioj de franclingvanoj*'. *Linx*, n-ro 33, p. 15-30. <<https://doi.org/10.3406/linx.1995.1389>>; lasta vizito: 31 Aŭg. 2020.

Ilona KOUTNY (2015). A typological description of Esperanto as a natural language '*Tipologia karakterizo de Esperanto kiel natura lingvo*'. *JKI*, n-ro 10, p. 43-62.

John LYONS (1991). *Natural language and universal grammar 'Natura lingvo kaj universala gramatiko'*. Cambridge, New York: Cambridge University Press.

Gaston MOCH (1897). *La question de la langue internationale et sa solution par l'Espéranto 'La internacilingva demando kaj ĝia solvo per Esperanto'*. Paris: Giard & Brière.

Marcel MONNEROT-DUMAINE (1960). *Précis d'interlinguistique générale et spéciale 'Studlibro pri ĝenerala kaj speciala interlingvistiko'*. Parizo: Librairie Maloine.

Arika OKRENT (2010). *In the land of invented languages 'En la lando de la inventitaj lingvoj'*. New York: Spiegel & Grau Trade Paperbacks.

Lilli PAPALOÏZOS (1992). *Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue: le Centre Culturel Espérantiste de la Chaux-de-Fonds (Suisse) 'Etnografio de la komunikado en socia alilingva medio: la Esperanto-Kulturcentro de la Chaux-de-Fonds (Svislando)'*. Bern: Peter Lang.

Mikael PARKVALL (2010). How European is Esperanto? A typological study '*Kiom eŭropeca estas Esperanto? Tipologia studo*'. *LPLP*, n-ro 34(1), p. 63-79.

Claude PIRON (1994). *Le défi des langues – Du gâchis au bon sens* '*La lingva defio – De la ĥaoso al komuna saĝeco*'. Parizo: L'Harmattan.

William Alexander STEWART (1968). *A sociolinguistic typology for describing multilingualism* '*Sociolingvistika tipologio por priskribado de plurlingvismo*'. En: J. A. Fishman, *Readings in the Sociology of Language*. The Hague: Mouton, p. 531-545.

Ida STRIA (2015). *Towards a linguistic worldview for artificial languages* '*Al la lingva mondovido por artefaritaj lingvoj*'. Disertacio, Universitato Adam Mickiewicz.

Marjorie WALLACE (1998). *The Silent Twins* '*La silentaj ĝemeloj*'. London: Vintage books.

Marina YAGUELLO (2006). *Les langues imaginaires* '*La imagaj lingvoj*'. Parizo: Ed. du Seuil.

Biografio de la aŭtoro. Philippe PLANCHON estas ŝtata instruisto kaj esploristo en la Fakultato pri Literaturoj kaj Lingvoj de la Universitato de Tours en Francio. En 2013, li sukcese defendis doktorigan disertacion pri eldirada lingvistiko, kaj la sekvantan jaron li estis nomumita ĉe la Universitato de Tours kiel docento, kie li instruas nun lingvistikon, i.a. pri leksikologio, semantiko, pragmatiko, interlingvistiko kaj kompara lingvistiko. Lia esplor-kampo estas la diverseco de la lingvoj kaj la konstruado de la vortosignifoj. Li estas membro de la lingvistika laboratorio LLL (*Laboratoire Ligérien de Linguistique*, UMR 7270).

„Kariero” pere de Esperanto

de Gražina OPULSKIENĖ, Mažekių Merkelio Račkausko-gimnazio (Litovio)



Dum VEKI estiĝis konversacio, pri: kian praktikan utilon havas Esperanto en la vivo? Inter kelkaj ekzemploj, kiujn donis homoj de la grupo, ankaŭ mi enŝovis la informon, ke danke al Esperanto mi havas laboron jam dum 25 jaroj. Nia kara Mirejo tuj reagis, ke tio povas esti interesa ankaŭ por IPR-legantoj, do jen la rakonteto.

En 1993 oni fermis la fabrikon, en kiu mi laboris ekde mia 17-jaraĝo. Pro la sendependiĝo de Litovio el

Sovetunio, la fabriko ne plu funkciis, ĉar ni ne plu havis ekonomiajn rilatojn. Mi iĝis senlabora kaj por ricevi de la ŝtato la etan monhelpon al senlaborulo, mi balais la stratojn de mia naskiĝurbo. Tio estis interesa sperto: ja nun mi vidas, kie estas malordo!

Iun tagon alparolis min amikino de mia juneco, kiu nun estas la vic-direktorino de mezlernejo. Ŝi sciis, ke mi estas esperantistino kaj proponis al mi, ke mi instruu Esperanton en lernejo po du horoj ĉiusemajne en „Rondeto de Esperanto” dum mi ne havas laboron. La kialo estis, ke la mezlernejo tiam strebis rricevi la nomon de gimnazio. Tiu nomo estis forigita dum la sovetia tempo kaj tuj post la sendependiĝo gimnazioj estis nur mezlernejoj kun pli alta instruada nivelo ol „simplaj”. La estraro de la lernejo opiniis, ke instruado de plia lingvo estus granda pluso.

Mi neniam volis esti instruistino, kvankam mia patrino kaj miaj instruistoj opiniis, ke tio estus mia vojo. Mi kredis, ke labori kun petolemaj infanoj kaj klaĉemaj virinoj ne estas interese kaj ke sola avantaĝo de instruista profesio estas la longa somera feriado. Kaj ... kvankam mi sekvis kurson de Esperanto en 1998, vere mi esperantistiĝis nur en 1992 dum SAT-kongreso en Litovio. Kiel mi instruu, se mi mem ankoraŭ devas lerni?

La amikino-vicdirektorino sugestis, ke temas nur pri du horoj en la semajno, ke instruado estas la plej bona vojo al lernado, ke min neniu povos kontroli, ja neniur urba inspektoro konas Esperanton. Tiel mi en 1994 septembre eklaboris en la lernejo. Mi havis du grupetojn po eble deko da lernantoj. Mi instruis laŭ la franca libro „Esperanto junul-kurso”, donacita de mia amikino Franciska Toubal kaj ankaŭ laŭ miaj notoj de la propra lernado. Je mia miro labori kun junulinoj estis ege interese!

Inter miaj du grupetoj mi devis atendi unu horon en la instruista ĉambro kaj ekzakte tiam libera estis ankaŭ la maljuna instruisto pri la angla. Li estis ege klera persono kaj interesiĝis pri Esperanto, eĉ petis, ke mi iom instruu al li. Mi ŝerce diris, ke reciproke li devos kun mi refoje paroleti la anglan, ĉar mi ne scipovas ĝin, kvankam mi lernis ĝin en lernejo. Tio funkciis inter ni, do jam bonŝanco!

Tuj post la sendependiĝo multaj lecionoj pri la rusa lingvo estis ŝanĝitaj al la lecionoj de la angla, sed terure mankis instruistoj. Mia maljunega kolego devis labori kun plena klaso de 30 gelernantoj kaj tio estis malfacilega. Li diris al la direktorino, ke aŭ oni disdividu la klasojn al du grupoj, aŭ li pensiiĝos. La direktorino ĝemis, ke ŝi nenie ricevos la instruiston por la dua duono de la klaso kaj mia kolego proponis, ke al tiuj lernantoj, kiujn la angla

tute ne interesas, ekinstruu ... mi. Tiel, pro la insista premo de la direktorino, mi neatendite ekhavis 24 lecionojn dum la semajno! La infanoj estis 12-13-jaraĝaj, absolute ĉarmaj kaj tute normale petolemaj. Instrui la anglan ne plaĉis al mi pro la konstanta timo, ke mi instruas tion, kion mi mem ne scias, sed labori en lernejo ege plaĉis al mi. Instrui Esperanton iĝis tre interese, ja mi jam konis multajn infanojn, ili konis min kaj anstataŭ 2 lecionoj semajne mi havis jam 4 kaj, post kelkaj jaroj, eĉ 6 lecionojn. Intereso pri la lingvo iomete kreskis! Miaj kolegoj tute ne estas klaĉemaj, ili simple eĉ ne havas tempon por tio en la lernejo, dum etaj interlecionaj paŭzoj estas multaj gravaj aferoj por preparoli!

Mi mem devis plulerni Esperanton por iĝi vera instruistino. Bonŝance mi renkontis multajn helpemajn esperantistojn kaj plej gravis, ke mi amikiĝis kun Ewa Bondar, la elstara Cseh-instruistino el Pollando. Ŝi tuj sugestis al mi instrui laŭ Cseh-metodo. Mi sekvis la kutiman vojon de seminarioj, taskoj kaj ekzamenoj de IEI (Hago) kajla diplomo de Cseh-instruistino malfermis al mi vojon ankaŭ al instruado en Esperantaj aranĝoj. La fakto, ke mi instruis en Kroatio, Italio, Aŭstralio, Francio, Japanio, Nov-Zelando kaj aliaj landoj multe imponas kaj al miaj lernejoj kaj al la infanoj.

Post kvin jaroj de mia fuŝado pri la instruado de la angla, aperis junaj instruistoj freŝe bakitaj de universitatoj. Tamen la direktorino ne volis min maldungi, Esperanto-rondeton ŝi volis havi en la gimnazio. Mi ne povus vivteni min nur per la instruado de Esperanto kaj ŝi donis al mi tiel nomatajn lecionojn pri „sekureco” al lernantoj de la sepa-gradaj klasoj. Instrui tion estis facile, ja mi nur klarigis kiel kondukti dum incendioj, danĝero de eksplodo de atoma centralo aŭ bombo, kiel savi la dronintojn, helpi dum atako de paniko kaj simile.

Mi denove havis la liberajn lecionojn, tiel nomatajn „fenestrojn”, mia maljuna kolego pensiiĝis, do ne eblis lecionetoj inter ni, sed en la lernejo aperis la unuaj tri komputiloj! Ĉiun liberan minuton mi pasigis en klaso kun tiuj komputiloj kaj lernis kune kun la instruisto kaj infanoj. Estis eĉ ne Windows ankoraŭ, sed mi jam vidis komputilojn en eksterlando dum miaj Esperanto-vojaĝoj kaj eksciis, ke valoras lerni, certe baldaŭ ili venos al nia vivo.

En 1999 ni eksciis, ke nia gimnazio estos reorganizita tiel, ke ni ne plu havos la tre junajn klasojn kaj lernos ĉe ni nur 15-19-jaraĝaj gejunuloj. Miaj sekurec-lecionoj devis malaperi, sed bibliotekistino de la lernejo jam delonge postulis duan homon por la duono de la tago. Estis ideo de la bibliotekistino

demandi la direktorinon, ĉu oni akceptos min en tiu posteno. La direktorino nepre volis konservi min pro la Esperanto-rondeto, ĉar estis malmultaj lernejoj en Litovio, kie oni tion instruas. Plia avantaĝo estis, ke estis klare, ke lernantoj, kiuj lernas Esperanton, poste estas multe pli sukcesaj en la latina lingvo, kiun ili lernas en la lastaj du jaroj de la gimnazio. Finfine la direktorino estis feliĉa donante al la biblioteko ankaŭ unu malnovan komputilon jam kun Windows kaj per ĝi mi ofte instruis kolegojn kaj infanojn kiel labori per Word kaj Excel.

Tiel mi ekde 1999 eklaboris en la biblioteko kun duontaga posteno, sed tre baldaŭ havis ĝin plentaga kaj nun trankvile atendas pensiiĝon: biblioteko, Esperanto-rondeto kaj ordigado de la gimnazia arkivo estas tri miaj taskoj en unu el la plej bonaj lernejoj de la lando. Miaj iamaj amikoj de la fabriko, kiuj same maldungiĝis en la naŭdekaj jaroj, havis aliajn sortojn: viroj ja ricevis laborojn en aliaj fabrikoj, sed virinoj aŭ vendas ion en bazaroj kaj vendejoj, aŭ elmigris, aŭ estas longjaraj senlaboruloj. Danke al Esperanto mi ne nur havas laboron dum kvarono de jarcento, sed ankaŭ eblon ekkoni la mondon tra miaj propraj spertoj.

Ĉu la parolo de la instruistoj ankoraŭ aŭtoritatas?

La terura murdo de Samuel Paty povas pensigi, ke la instruista parolo ne plu aŭtoritatas en iuj situacioj, kie instruistoj prezentas sciojn, kiuj estas en la lernejoj instruplanoj, sed kiuj estas kontestataj de parto de la socio. Kiuj estas la kaŭzoj kaj la konsekvencoj de tia malfortiĝo? Kiujn rimedojn povas uzi instruistoj? Sed ankaŭ, kiaj limoj estas al ilia agado?

Jen la opinio de Bruno Robbes, universitata profesoro pri edukaj sciencoj, CY Cergy Paris Universitato.

https://fr.wikipedia.org/wiki/Bruno_Robbes

Por pli bone kompreni la defiojn, kiuj aperas en klasĉambro, unue ni devas revizii la malsamajn konceptojn de la vero, kiuj transiris tra la historio, tiu de la scio, tiu de la informoj kaj tiu de la kredoj.

Ni memoru, ke antaŭ 1789 la scio emanis el transcendeco (Dio), de kiu iuj homoj – ĉefe la reĝo – akiris sian aŭtoritaton. Dum la Renesanco (16-a jarcento) pres-arto, protestantismo kaj la liberpensuloj helpis rekonsideri la

principon de transcendeco favore al la principo de racieco: ekde tiam la scio legitimiĝas per la kohereco de la asertoj.

Ekde la Klerismo en Eŭropo (18-a jarcento) la daŭra disvolviĝo de la sciencoj plu establis la principon de la racieco. Sed tio ne malhelpas, ke la sciencoj estu pridubataj aŭ eĉ kontestataj. Estas **pluraj kialoj** por ĉi tio:

Unue, **la ideo, ke la vero de la sciencaj sciencoj restas portempa**, estas vaste disvastigita. La scio reflektas la nunan staton de niaj sciencoj, kiuj esence evoluas. Krome, dum la dudeka jarcento, la ideo de daŭra homprogreso danke al la racio, la scienco kaj la "civilizo" estis konsiderinde kontestata, kiam la teknika racio devis servi la tutmondajn kaj koloniajn militojn, aŭ totalismajn sistemojn. Ĉi tiuj elementoj helpis mallegitimigi la sciencojn.

Due, **la kreskado de ciferecaj teknologioj** - kaj kun ili la projekto de „socio de la konoj” – metas la sciencojn en similan nivelon kiel la scio kaj reduktas ĝin al informo. Akiri sciencojn egalas al prilaborado de informoj, sen ia rilato kun la fundamentaj homaj demandoj, de kie fontas la sciencoj amasigitaj tra la generacioj. Tamen la enlokigo de la sciencoj en la kulturon helpas al komprenado de la nuntempa mondo.

Trie, **la kredoj** ne malaperis kun la kresko de la sciencoj. Ili donas respondojn al iuj esencaj homaj demandoj, kiuj estas fundamente malsamaj ol sciencaj respondoj. Sed male al la sciencoj, kiuj produktas sciencojn sub tre specifaj kondiĉoj, la kredoj ne povas esti pruvitaj. Al ili ni aliĝas aŭ ne, kio ne signifas, ke ili ne estas la temo de interpretaj debatoj.

Fino de la lerneja monopolo?

Unu el la nunaj malfacilaĵoj naskiĝas de la konfuzoj – foje malkaŝe konservitaj – inter sciencoj, kredoj, informoj kaj opinioj. Certe, fundamentismaj religiaj grupoj deklarante siajn kredojn samnivelaj kiel la sciencoj, asertas, ke ili diras la veron malfavore al ĉi-lastaj, sed ili ne estas la solaj. En la post-vera epoko eminentaj politikistoj kaj responsuloj enkondukis tiun strategion en la plenumadon de la potenco, disvastigante falsajn informojn aŭ favorante kritikendajn sciencajn laborojn, foje komplike kun la esploristoj.

Esence, **ekzistas tri kontraŭaj konceptoj de la vero:**

- **la vero de sciencaj sciencoj** estas klasika vero (io estas vera, se ĝi pruviĝas per scienca rezonado);

- **la "socio de la konoj"** iras kune kun pragmata vero (io veras, se ĝi produktas palpeblajn tujajn efikojn);
- **la kredoj** baziĝas sur rivelita vero, nepruvebla (io estas vera, se ĝi fontas el transcendeco, el vortoj skribitaj en sanktaj tekstoj).

En lernejo regas la unua koncepto. Ĝi tamen konkurencas kun la du aliaj. La lernejoj ne povas esti instruataj kiel kredoj. **La aŭtoritato de la instruisto** ne plu povas baziĝi nur sur la scioj, kiujn ili posedas kaj eldiras.

Klare, havi sciojn estas nepra kondiĉo, sed ne sufiĉa por instrui al studentoj, kiuj, pli ol en la pasinteco, kontraŭas la sciojn nome de aliaj aŭtoritatoj (familio, amikoj, religiuloj ktp.). Kiam eblas, la eksperimenta aliro, sed ankaŭ la historio de la scienco, estas valoraj instruaj rimedoj. Krome, kun la "cifereca revolucio", la lernejo ne plu havas la ekskluzivan rajton transdoni sciojn kaj la instruistoj ne plu havas la monopolon de fidinda scio, pro la fakto, ke plej multaj studentoj povas aliri diversajn kaj kontroleblajn sciojn.

Sed la parolo de la instruistoj ankoraŭ konkurencas kun la individuismaj kaj produktivaj valoroj de novliberalaj socioj. La industriaj kaj financaj internaciaj kompanioj diskonigas ilin per regado de la aŭdvidaj kaj ciferecaj amaskomunikiloj. Ĉi tiuj novaj aŭtoritatoj „diktas” la valorojn kaj la konduton de junuloj. Ili kaptas ilian atenton, por kontentigi iliajn primarajn impulsojn por tujaj kaj senlimaj plezuroj, posedi por ekzisti kaj esti kiel la aliaj, en pasiveco kaj sen peno.

Ni konstatu, ke lernado postulas tute alian sintenon: la studento devas minimume regi siajn impulsojn, toleri frustriĝon kaj prokrasti sian plezuron, akcepti disciplinon, kiu ebligas al li/ŝi esti en kondiĉo de kognita agado, sed ankaŭ fari longdaŭrajn klopodojn. Rezulte, la aŭtoritato de la instruistoj ne plu baziĝas nur sur iliaj vortoj; aliflanke la praktiko de la profesio draste ŝanĝiĝas. Per uzo de didaktikaj kompetentecoj (organizado kaj prezento de la akirotajtoj) kaj per pedagogiaj kapabloj (organizado de spaco, tempo, rilatoj en la klaso, materialaj kaj teknikaj aspektoj), la instruistaro en siaj lecionoj kreas kondiĉojn, kiuj ebligas al la studentoj vere akiri sciojn, ne simple el la buŝo de la instruisto, ne simple kredi la instruiston "laŭparole".

Malgraŭ tio la studentoj ne devas „retrovi” aŭ „reinventi” la sciojn. La instrua / lerna situacio devas helpi ilin ŝanĝi sian fokuson de nekompletaj aŭ eraraj prezentoj al formulado de aliaj demandoj. Nova scio havos sencekon por

ili, se ĝi donas al ili respondojn al ĉi tiuj demandoj fontantaj el ilia homa sperto.

Gvidi la lernantojn al pripenso pri la scioj fariĝas do grava afero en la lernejo, ne nur por legitimi la aŭtoritaton de la instruistoj, sed ankaŭ por ke la studentoj akiru subjektivan, kritikeman kaj emancipiĝan aliron al scioj. Iuj instruistoj fariĝis spertuloj pri instruado de tiklaj instruprogramoj. Ekzistas ankaŭ lertigado, kiu prezentas mekanismojn por analizi ĉi tiujn situaciojn. Pedagogoj, esploristoj kaj la Ministerio pri Nacia Edukado mem akceptas la defion trejni studentojn, por ke ili akiru kapablon analizi la mondon per kritika vido.

Sociaj kaj politikaj sekvoj

Rimedo ekzistas, sed ne ĉiuj instruistoj estas trejnitaj al tiaj situacioj, kaj mankohava kompletiga lertigado de la instruistoj ne helpas al tio. Tial ni ne miros, ke iuj rezignas aliri al ĉi tiuj temoj, kiuj ĝenas ilin, precipe se estas premoj de la lernejestro aŭ kritikemaj admonoj de la inspektoroj.

La parolo de politikaj responsuloj pri la aŭtoritato de la instruistoj ne donas pli da subteno. Senĉese sugestante - kiel faras la nuna ministro pri Nacia Edukado – ke la instruistoj bezonus, ke la "scienco" determinu la "sukcesajn praktikojn", kiujn ili apliku poste, iliaj kvalifikoj estas malestimataj kaj naskiĝas dubo pri ilia kapablo kolektive plibonigi siajn farmanierojn. Ĉi tiuj paroladoj, kiuj signifas, ke la instruistoj estus nur simplaj prezentistoj, misfamigas ilian aŭtoritaton antaŭ la publika opinio.

Pli ĝenerale, la ripetiĝantaj malfacilaĵoj, kiujn nia nacia reprezentantaro havas por difini la celojn, kiujn la socio asignu al la lernejoj (ekzemple per la ofteco de ŝanĝoj en la lernejaj programoj), sen korekti la malegalecojn en la lernada sukceso, kiuj rilatas al la socia origino, nur pliigas ĝian misfamigon en popularaj rondoj.

Finfine, fronte al atenco kiel tiu suferita de nia kolego, la respondo estas antaŭ ĉio politika. Ĝi fontas el kohereco de vortoj kaj decidoj, por rezisto de la tuta socio al la totalisma projekto de la politika islamismo, kiu kontraŭas niajn valorojn.

Ĉi-tiu artikolo aperis origine en „The Conversation” la 3-an de novembro 2020. (Vidu ĉe: <https://theconversation.com/la-parole-des-professeurs-fait-elle-encore-autorite-149023>)

Tradukita el la franca de Germain PIRLOT kaj Mireille GROSJEAN

Aldoni ĝojon al la vivo – danke al Esperanto. 10-jara laboro

Svetlana POGORELAJA, dumviva membro de UKrEA kaj REU (Ukrainio)

En Ukrainio nun multaj pensiuloj ne ricevas sufiĉajn estimon kaj bonkorecon.

Mi preferas instrui ĝuste al pensiuloj, do ne nur al tiuj, kiuj laŭ la aĝo pensiiĝis sed ankaŭ al, ekzemple, 20-30-jaraĝaj pensiuloj – invalidoj, se ili aliĝos al mia klaso. Mi preferas ĝojigadi per tiu valoro – nome Esperanto – soci-nedefenditajn personojn, nelabor-kapablajn, tiujn, kiuj ricevas de la ŝtato mizeran pension de malpli ol 2 eŭroj en tago (kiel mi). La homoj apenaŭ povas vivi pro nesufiĉa manĝo kaj kuracado, ili ne povas multe ĝoji.

Mi opinias ke ili devas konstante plifortigi sian karakteron kaj penegi vivi tiel ke ili povu ĉiutage ĝoji pro iuj siaj novaj sukcesoj. Mi ne havas eblon helpi al ili mone. Sed mi donas al la kompatinduloj jenan valorajon – mi instruas Esperanton. Mi strebas helpadi al la maljunuloj ekricevadi pli da estimo kaj bonkoreco, do ĝojigi – danke al Esperanto. Mi kreis miajn proprajn materialojn por instruado (mi ne uzas lernolibrojn de iu) kaj komence de 2010 mi fondis la unuan E-fakultaton en mia lando Ukrainio, ĉe la ĵusaperinta, la unua en la urbo Kievo, Universitato de la Tria Aĝo (ĝi estas fakultato, sed ne ordinara fakultato, ĉar estas instruataj multaj lernobjektoj kaj ĉar la lernantoj lernas ne nur dum kelkaj monatoj, sed dum jaroj – ĝis plena perfektigo). Lernas ĉarmaj personoj ĝis-85-jaraĝaj. I.a. la plej aĝaj estas la plej fervoraj.

Iuj miaj lernantoj ŝatas elpaŝi, ili **preparas** 20-30-minutajn **prezentaĵojn** en Esperanto pri la temoj, kiuj interesas ilin, kaj mi helpas al ili viziti kolektivojn, kiuj kun intereso ilin aŭskultas.

Tiuj, kiuj volas plibonigi sian malbonan memor-kapablon (kiam ili tute ne povas ion lerni), post kiam ili diligente lernas vortojn, vortkombinojn k.a., jam je la fino de la lernoĵaro komencas kapabli memori versaĵojn. Ekzemple, unu mia lernantino, kiu komencis lerni 73-jaraĝa, havante tre malbonan memorkapablon, tiom ekŝatis la lecionojn kaj la hejmajn taskojn, ke ĝis la fino de la lernoĵaro ŝi ne nur kapablis memori versaĵojn kaj kantojn, sed ŝi ankaŭ ekkapablis **verki** en la internacia lingvo belajn **rakontojn**. Ŝi eĉ fariĝis laŭreato de internacia konkurso de amatoraj verkistoj pro sia rakonto pri tio,

kiom al ŝi plaĉas lerni la internacian lingvon Esperanto, kaj ke ŝi ne povas vespere ekdormi, se ŝi ne verkis regule rakonteton en ĉi tiu lingvo.

Alia persono ekŝatis **krei versaĵojn** kaj fariĝis laŭreato de internacia konkurso de amatoraj poetoj (ŝi skribis en la nacia lingvo, ke ĉiuj lingvoj estas estimindaj sed Esperanto estas tre inda por ke ĉiuj homoj lernu ĝin).

Dezirantoj – lernas **verki ĵurnalistajn artikolojn**.

Mi instruas ankaŭ **instrui**.

Unu lernantino ne povis bele deklami poeziaĵojn, sed ŝi tre diligente lernis tion en la Esperanto-fakultato kaj ekkapablis tiom **bele reciti versaĵojn** en Esperanto – kiel aktorino (i.a. sonetojn de Ŝekspiro), ke ŝi rakontis ilin ofte kaj al ĉiuj, eĉ al tiuj siaj konatoj, kiuj Esperanton ne scias.

Min tre ĝojigas la vortoj de miaj lernantoj-pensiuloj, kiam ili dankas min pro tio ke, malgraŭ tio, ke ili dum multaj jaroj loĝas en Kievo, sen la fakultato de Esperanto ili neniam povus viziti tiom multe da vidindaĵoj, muzeoj, ekspozicioj, ekskursoj, koncertoj en la urbo, partopreni en tre interesaj vojaĝoj al aliaj urboj, perŝipaj veturoj, kaj eĉ konversacii kun alilandanoj el la tuta mondo (ĉion tion mi organizas por ili senpage). Ja ili tion ne povus, sed vere ili povas! Kaj mi tre volas, ke miaj lernantoj havu sufiĉe da sano kaj tempo por viziti kiom eble plej multe da interesaj lokoj pere de la Esperanto-fakultato.

Tiuj, kiuj volas ekkapabli **krei la tekstojn de ekskursoj en la internacia lingvo kaj gvidi** la ekskursojn diligente lernante en la Esperanto-fakultato, ricevas tiun kapablon. Ekzemple, unu lernantino, post la fino de la unua lernoĵaro jam povis dum unu tago memstare gvidi ekskurson en Kievo por alilandanoj, kiuj partoprenis en la tritaga internacia E-aranĝo, kiun mi organizis speciale por miaj novuloj, por ke ili pli facile praktiku la paroladon kaj povu lerni bone gvidi ekskursojn. Alia persono, post sia unua lernoĵaro, preparis kaj gvidis tutagan ekskurson al du urbetoj kaj unu vilaĝo de la kieva provinco por ke ni admiru la belan naturon kaj antikvajn historiajn lokojn de la tempo, kiam naskiĝis nia ŝtato. Alia pensiulino – kun mia helpo - kreis kaj gvidis en Esperanto por gastoj el 6 landoj 2-horan ekskurson en alia urbo, kie ŝi antaŭe neniam estis. Alia (80-jaraĝa) – post unujara lernado – organizis 3-tagan E-aranĝon en alia urbo.

En Kievo, dum pli ol 10-jara ekzisto de la Esperanto-fakultato, ni renkontiĝis kaj **konversaciis** montrante la urbon, **kun gastoj el diversaj**

partoj de la planedo: el Pollando (Eŭropo), Usono (Norda Ameriko), Japanio (Azio), Brazilo (Latina Ameriko) kaj aliaj landoj.

Mi tre ĝojas pro tiuj miaj lernantoj, kiuj - danke al scio de Esperanto - vizitas diversajn tre interesajn **internaciajn kongresojn**, en kiuj ĉeestas multaj centoj da reprezentantoj de diversaj kontinentoj, kaj miaj lernantoj-pensiuloj kun kiu ajn el ili povas paroli. Min plejmulte ĝojigas tiuj, kiuj volas kaj vere tion faras – veturi senpage al diversaj landoj de la mondo. Mi volus, ke pli multe da homoj veturu tra la tuta mondo.

Se al iu mankas **kantado** – en Esperanto ni kantas kaj originalajn kaj tradukitajn kantojn de diversaj landoj.

Se oni volas **aktori** – en la lecionoj ni okupiĝas pri diversaj mini-spektakloj kaj organizas ludforme spektaklojn, ni tre ŝatas hejman teatron.

Ni **sonigis filmetojn** pri la plej gravaj ukrainiaj vidindaĵoj, ekz., pri la Kieva-Peĉerska monaĥejo: https://www.youtube.com/watch?v=M1AYlbumc_U aŭ en YouTube Kieva-Pecerska Lavra Libera Ukrainio.

Multaj miaj lernantoj-pensiuloj diras al mi, ke ili estas feliĉaj pro tio, ke al ili estas donita la eblo **ludi** diversajn **ludojn** (de facilaj aĉetablaj ludoj ĝis malfacilaj urboludoj), ke ili tiam sentas sin kiel feliĉaj infanoj.

Sed por eĉ pli da ĝojo doni al miaj lernantoj, mi instruas al ili ankaŭ multe da io neligita kun lingvoj, ekz.: **manfaradon, orkestran muzikludadon, fotoarton, arterapion, presdigadon** (t.e. magiaĵojn kaj iluziaĵojn) k.a.

Nun, en 2020, dum la kvaranteno, ni kontaktas ilin per telefono, ĉar ili pro malriĉeco ne havas komputilon (ankaŭ mi). Krome, mi nun kun ĝojo helpas per skajpo al grupo de polaj pensiuloj (el diversaj urboj kaj vilaĝoj) paroli kaj perfektigi.

Mi opinias, ke: se kaj la lernantoj-pensiuloj kaj la instruisto laboros tre diligente kaj respondece, nepre la rezultoj estos tre altaj. Iam ili eĉ superos la rezultojn de junuloj.


Mi tre amas Esperanton kaj E-instruadon. Min tre ĝojigas miaj lernantoj. Mi nomas ilin „Herooj de Ukrainio” kaj „Ĉampionoj” – ĉar dum la lastaj 10 jaroj neniuj aliaj (junaj!) personoj (ĉe aliaj instruistoj) en Ukrainio atingadis la rezultojn, kiujn sukcesis atingi miaj karaj lernantoj.

Mi estas certa, ke: ne devas esti simple instruado de io al pensiuloj. Nepre ĉiuminute devas esti atingata tiu celo: plenumo de la tre bezonata nobla tasko – **aldonadi ĝojon, feliĉon al la vivo de maljunaj homoj.**

Pri kio temas?

(recenzo de Rob MOERBEEK)

Szabolcs SZILVA: *Pri kio temas? Ellaboraĵo de la 15 temoj de la B2-nivela KER-ekzameno.* Lingve, 2020. 175 p. 11,70 eŭroj.



Kapta titolo de belaspekta studhelpilo, per kiu Szabolcs SZILVA, hungaro en Varsovio, orientas kandidatojn por la B2-ekzameno, kiel respondi al demandoj pri fiksitaj 15 temoj. Kaj tion li faras tre kompetente, mem sin prezentante kiel diplomitan spertulon pri instruado kun specialigo pri ĉiĉeronado kaj i.a. finn-ugraj lingvoj.

Post ĉiuj laŭtemaj rakontoj sekvas atendeblaj ekzamenaj demandoj kaj vortlisto, en kiu la aŭtoro montras ankaŭ la (ne)transitivecon de la verboj. Bonega iniciato, imitinda.

Temas pri personaj respondoj de klera historiisto kaj muzeologo. Tamen la lingvaĵo restas plaĉe komunuza kaj modela.

Kritiko ĉiam restas ebla – kiu ja eskapas la homan stumblemon, la maleblon ĉion scii aŭ memori – kaj evidente en la fino foje malstreĉiĝis la atentemo. Do ni prezentu kelkajn notojn por helpi plukonstrui. Kaj ni defendu kelkajn uzojn.

En la kvara ĉapitro „Lernado” ni trovas „Lingvoklasejo” (p. 45), por kiu ejo PIV konas nur „klasĉambro”. Tamen mirigas, ke „klasejo” ne prezentiĝis en la tekstoj, kiujn uzis la PIV-redaktoroj.

Jam kutime oni uzas „malŝati” en ne-PIVa senco „neŝati”; „motivita” (pravigita) anstataŭ fervoriĝinta. „Ni tre atendas tiun vojaĝon” ŝajnas iom streĉi la signifon de „atendi”(avidi, esperplene anticipi). Akceptebla tamen.

Foje „je” ne necesas anstataŭ konvena prepozicio: instigi je sana vivmaniero: al...

Komplete mismiksiĝis la frazo „spektakloj kie oni ricevas ju pli da mono, des pli oni scias”.

„Dum la akademia jaro” jam tiel enradikiĝis, ke eĉ PIV-a puno ne korektus al „universitata”.

„Deviga infanĝardeno de tri ĝis 6 jaroj” povus doni impreson de iom longa maturigo tiustadia. Pli klara esprimo: de la 3-a ĝis 6-a vivojaroj.

„Abiturientiga diplomo” montras precizemon; multaj dirus „abiturienta”.

Gramatika enigmo: ekzameno *povas daŭri de 10 minutojn ĝis kelkajn horojn*. Ĉi-okaze oni donu la avantaĝon de la dubo. Sed facila evito eblas per „povas havi daŭron de 10 minutoj ĝis kelkaj horoj”.

„Ellerni la esceptojn... donis al mi la plej multe da malfacilaĵoj”: jen pruvo ke PIV prave rekomendas uzi „multo(n) da” aŭ „multa(jn)” pro gramatikaj kialoj. Ĉe adverbo (multe) la uzo de „la” ne estas ĝusta, eĉ se tiuokaze perdiĝas la diferenco inter la absoluta kaj relativa superlativoj.

En la frazo „La Bolonja sistemo servas ankaŭ fortigi la internaciajn rilatojn”: sentiĝas la manko de „por” (fortigi).

En la vortlisto povas misgvidi „ekzerci ion”, se akcepti la PIV-an malaprobobon uzi la temon kiel rektan objekton de ĉi tiu verbo: Oni ekzercas iun aŭ sin pri iu fako. Ja eblas ekzerci ion en la senco de korpoparto aŭ organo: siajn fingrojn pri muzika tonvico, sian voĉon pri rulado.

Ofte mankas la komo post subpropozicio ene de frazo: „estas grave, ke oni atentis (atentu?) pri tio, kion oni ŝatas, kaj laŭ tio oni elektu laboron” (kion oni ŝatas, kaj laŭ kio oni elektu).

„Plej bone estas kiam (estu: se) oni povas igi sian hobion sia laboro” (PAG-gramatike: onia, sed mi akceptas „sia” post „sian hobion”). Kaj – kontraste kun PAG ~ la nova „PMEG 2020” klare elektas „sia” en la objektaj predikativoj, laŭ la Zamenhofa: „Tio estis la unua fojo, kiam ŝi nomis ŝin sia filino.”

„Feritagoj” memorigas pri la tro ofta (ne ĉe Szilva) „kielmaniere” (neniam ”kieloke”) aŭ „tagĵurnalo”: ĵurnalo estas taggazeto kaj ferio estas senlabora tago. Kial oni amas pleonasmajn?

„Oni anoncas sian senlaborejan staton”: eble anoncas sian senlaboran staton ĉe la administrejo?

En la vortlisto: „malvesti ion”, sed „vesti iun”: simile do oni malvestas iun/sin je mantelo.

Iom amuza „amfibologio” (stila fakvorto, laŭ PIV evitenda!): „mi uzas ĝin (Netflix)... sur mia televidilo kaj dum veturado sur mia telefono”.

P. 64... „anongi sin kiel sangodonanto”: se oni jam estas sangodonanto, kial anonci sin? Certe necesas la akuzativo: kiel sangodononton aŭ por sangodonado (eĉ se ne eblus anonci alian kiel sangodonanton).

Tamen tio ne deprenas poenton de la valoro. Mi volonte rekomendas la studilon, el ĝi multe mem lerninte!

El la landoj kaj sekcioj...

Ĉinio

Finiĝis la Esperanto-kurso ĉe la universitato de Nanchang, Ĉinio

En la jaro 2020, sukcese funkciis en ĉiu semestro Eo-kurso ĉe la universitato de Nanchang. El la ĵus finita Eo-kurso, 45 studentoj trapasis la finekzamenon kaj ricevis po du poentojn. Jen la foto de la studentoj kun la verda flago post la lasta leciono. Nova Eo-kurso komenciĝis la 4-an de marto.



Prof. Dr-o GONG Xiaofeng (Arko)

Hungario

La unua virtuala asembleo de ILEI-HU

La 21-an de marto membroj de EPME (Hungara Asocio de Esperantistaj Instruistoj, t.e. la jure agnoskita ILEI-HU) havis sian unuan virtualan asembleon. La ĉefaj tagorderoj estis: la pridiskuto de la financaj kaj agadaj raportoj pri la jaroj 2019 kaj 2020.

Laŭ la hungaraj leĝoj, ĉiuj asocioj devas sendi la oficialan bilancon al centra datumbazo, kie ĝi estas poste publike alirebla. (La bilancon ni aperigas ankaŭ en la hejmpaĝo de ILEI-HU ĉe <https://www.ilei.info/hungario/index.php>).

Pro la pandemio ni povis fizike kunveni nek en 2020, nek en 2021. Feliĉe, en nia nova statuto akceptita en 2016, estas eblo, ke niaj membroj povu partopreni en la asembleoj ankaŭ pere de aŭdvidaj retaj kanaloj.

Ni havas 38 membrojn en 2021, en la asembleo partoprenis 16 kolegoj. Feliĉe, laŭ la statuto, estas eblo kunveniĝi duan asembleon, samtage, kie por havi kvorumon ni ne bezonas 50%-ojn.

La asembleo akceptis la raporton de la estraro kaj ĝi aperis publike.

Por la kunveno ni uzis Zoom, kun teknika helpo de Katalin Kováts (edukado.net).



Jozefo NÉMETH, sekciestro

Italio

Carlo BOURLOT, 08.06.1947-20.03.2021

Ŝoka funebra sciigo trafas hodiaŭ la membrojn de la Itala Instituto de Esperanto, aparte, kaj la italan esperantistaron, ĝenerale: forpasis Carlo Bourlot, Ĝenerala Direktoro de IIE jam de pluraj jardekoj, posteulo de Dino Fabris el Cittadella kaj intertempe de Paola Gozzi Gorini el Mantova.



Prof. Fabrizio Pennacchietti kaj Carlo Bourlot (dekstre) – en la ekzamena komisiono en Torino dum la unua tutmonda KER-sesio

Carlo Bourlot mortis 74-jaraĝa en la ĉefa hospitalo de Torino, „Le Molinette”, pro kron-viruso, kiu lin trafis jam penige suferantan pro pulma kancero. Li estis membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), membro de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) ekde 1999, Mondcivitano ekde 2003 kaj plurjardeka membro de la Esperanto-grupo de Torino (CET). Carlo devenis de familio el Villar Perosa en Val Chisone apud Pinerolo, industria (SKF) vilaĝo kie komence de la 20-a jarcento floris laborista Esperanto-grupo. Lia patrino, Esther Bourlot, estis fervora esperantistino. Ŝi instruis nian lingvon duonjare (somere-aŭtune) en Italio, duonjare (vintre-primtempo) en Argentino. Carlo, antaŭ sia pensiiĝo, estis sukcesa elementlerneja instruisto en Torino. Li estis homo kun ne tre glata karaktero, tamen fidela kaj malavara amiko, aktiva kaj senlaca laboremulo, skrupula kaj ĝisdatiĝema Ĝ.D. de IIE. Carlo-n priploras la edzino Maria Teresa, filo Stefano, filino Elena kaj pluraj genepoj.

La Direktoro de IIE Fabrizio A. Pennacchietti kaj la estrarkunsido de IIE

Pollando

Nova studgrupo pri Interlingvistiko startos en septembro

Unika eblo akiri instruistan kvalifikon en AMU



Postdiplomaj
Interlingvistikaj Studoj
en AMU - Poznańo (Pollando) 2021-24

La Adam Mickiewicz-Universitato (AMU) en Poznańo, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, proponas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio. La **internacia kursaro** okazas en la Etnolingvistika Instituto, sub la gvido de prof. Ilona Koutny kaj kun la kontribuo de elstaraj esperantologoj kiel *Věra Barandovská-Frank*, *Tomasz Chmielik*, *Nicolau Dols*, *István Ertl*, *Ida Stria*, *Michael Farris*, *Sabine Fiedler*, *Aleksander Korĵenkov*, *Katalin Kováts*, *Aleksander Melnikov* kaj *Humphrey Tonkin*.



La **Interlingvistikaj Studoj** donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la **metodika formado** la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kaj poste kun Edukado.net.



La semestroj startos per 4-tagaj **intensaj sesioj** kun kvar studobjektoj (al ili aldoniĝos poste la ekzamenoj). Dum la semestro okazos ankoraŭ po du semajnfinaĵaj sesioj. Laŭ la planoj nur la septembraĵaj sesioj estos surloke, la aliaj sesioj estos virtualaj. La unua sesio en septembro 2021 dependos de la virusa situacio. La dua semestro komenciĝos en februaro. La gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj konsultiĝas rete kun la prelegantoj (kontrolado de ekzercoj, eseoj kaj pliaj kurso-taskoj) kaj parte per reta

platformo. Post pretigo de finlaboraĵo kaj fina ekzameno ili ricevos atestilon pri postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj kiu valoras 120 ECTS¹⁵.

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la **1-a de aŭgusto 2021** por la studjaro 2021/2022. La unua sesio okazos inter la 21-a kaj la 25-a de septembro 2021. La sekvaj semajnfinaĵaj sesioj okazos fine de oktobro kaj komence de decembro.

Postuloj: diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto (min. B2). Partoprenontoj devas plenumi orientadan teston komence de la unua sesio. **Kotizo** por unu semestro: 1800 PLN (ĉ. 400 EUR por ĉiuj), en motivita kazo eblas peti redukton. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj danke al ESF (*Esperantic Studies Foundation*).

Pluaj informoj kaj aliĝilo: interlin@amu.edu.pl

Fonto: edukado.net

La 54-a ILEI-Kongreso en Kotonuo, 2021

Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj

La 54-a ILEI-Kongreso

**ESPERANTO
KAJ EDUKADO**

**Esperanto-kulturo
en Esperanto-kursoj**

7-14 aŭgusto 2021 Kotonuo, BENINO



¹⁵ Eŭropa Kredito-Transdono kaj Akumulado (NdIR)

Pro diversaj pandemiaj kaj organizaĵaj malfacilaĵoj, la Estraro decidis transloki la ILEI-Kongreson 2021 de Skotlando al Benino, al ĝia ekonomia ĉefurbo, **Kotonuo**.

La Loka Kongresa Komitato (LKK)

La prezidanto: Privas TCHIKPE (*vd. dekstre*)

Membro kaj prizorganto de financoj:
Mireille GROSJEAN

Membro, organizanto de la evento kaj
prizorganto de teknikaj flankoj: JUNG
Yuro (Unika)



La teknika flanko

Por la ĉi-jara ILEI-Kongreso, ni uzas retejojn por la kongreso kaj simpozio, kiuj estas kreitaj subtenite de la entrepreno EŬRODESIGN. La retejoj helpas ĉefe por informado kaj organizadon de la kongreso. Dume, la voĉdono-sistemo dum la komitat-kunsido estas subtenota de la entrepreno CIVIENCIA. Plie, la entrepreno subtenos ankaŭ la elsendon de la video-konferenco, kaj preparos grafikaĵojn, videaĵojn, reklamadon ktp.

Subtenatoj por la teknika flanko

La Estraro decidis subteni 2 junulojn por partopreni en nia kongreso (en kazo, se fizika kunveno okazos en Benino), kiuj helpos por ĝia teknika flanko.

Ĉu hibrida Kongreso?

Gravas, ke kvankam ni klopodas okazigi nian kongreson hibride, t.e. kaj surloke kun ĉeestaj partoprenoj kaj aranĝante elsendojn virtuale, tamen, **se malpli ol 20 personoj aliĝos por la ĉeesta partopreno, la Estraro rezignos pri la surloka okazigo de la Kongreso.** La decidkunveno ĉi-rilate okazos fine de majo, kaj la rezulto estos disinformata per diversaj komunik-kanaloj de ILEI.

Laŭ la Trimonata Raporto:

Malfacile survojas la preparlaboroj por la Kongreso. La temo estas difinita kiel „Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”. Fine de januaro la Estraro pritaksis kongres-kotizojn por la eventualaj fizikaj ĉeestaj partoprenontoj. La

kotizoj kovras la ĝeneralajn kostojn kaj estas por A-landanoj: 100 EUR, B-landanoj: 80 EUR, C-landanoj: 60 EUR. Estas ellaboritaj kaj aprobitaj ankaŭ afiŝo kaj emblemo por la kongreso. Ankaŭ survojas la preparado de la dutaga simpozio, pri kiu respondecas *Radojica PETROVIĆ* (vd. *sube*).

Jam estis kreita skizo de la detala programo. Laŭ la peto de la beninaj esperantistoj la Estraro pritaksis la eblon ŝanĝi la lokon de la kongreso de Kotonuo al Lokossa kaj, bedaŭrinde, devis rezigni pri tia ŝanĝo pro diversaj malfacilaĵoj, kaŭzitaj de KOVIM-19. Do, la planita loko restas Kotonuo. Pretas la ekskursiva programo. La decido pri okazigo de la surloka kunveno – kiel dirite supre – okazos en majo laŭ la nombro de sinanoncoj por ĉeestas partoprenado. Ĝis nun tiaj sinanoncoj ne atingis al dek.

JUNG Yuro (Unika)

ILEI-simpozio 2021:

Esperanto en universitataj medioj - nuntempo kaj estonteco

La simpozio okazos virtuale, 12/13 aŭg. 2021, kadre de la 54-a Kongreso de ILEI, kun partopreno de esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj kaj interesatoj, ĉefe universitatoj, per la programo *Zoom* teknike subtenata de IrEA (Irana Esperanto-Asocio).

La programo

La simpozio estas strukturita en kvar prelegblokoj:

1. *Komunikado en multlingvaj edukmedioj – problemoj kaj solvoj*
Ĉefpreleganto: Charles Ligan, Benino; diskutanto: Giridhar Rao, Barato
2. *Esperanto en supera edukado – mitoj kaj faktoj*
Ĉefpreleganto: Ilona Koutny, Pollando/Hungario; diskutanto: Adel Rafii, Irano
3. *Utiloj kaj defioj de neĉeesta lernado kaj instruado*
Ĉefpreleganto: Manuel Pancorbo, Hispanio
4. *Survoje al virtuala Esperanto-universitato – inter revo kaj realo*
Ĉefpreleganto: Vicente Manzano-Arrondo, Hispanio

Ĉiu prelegbloko havos enkondukan ĉefprelegon de invitita preleganto kun diskutanto, kiu, per siaj observoj kaj demandoj post la prelego, pliprofundigos kelkajn aspektojn de la temo. Por la ĉefprelegoj estas rezervita po unu horo inkluzive la paroladon de la preleganto, demandojn de

la diskutanto, kaj respondojn de la preleganto, ĉio kun intersekva interpretado. La laborlingvoj estos Esperanto kaj la angla, tamen se iuj prelegantoj deziras prelegi en iu alia lingvo, tio eblas kun interpretadoj en Esperanto kaj la angla.

La ĉefprelegojn en ĉiu bloko sekvos aprobitaj prelegoj de esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj/universitatanoj kun postprelega diskuto kun la publiko, ĉio kun intersekva interpretado, en suma daŭro po 40 minutoj. Se vi deziras prelegi en iu el la prelegblokoj, viaj prelegproponoj estos bonvenaj. Bonvolu skribi al <radojica.petrovic.rs@gmail.com> por pliaj detaloj.

Antaŭsimpozia enketo

Du demandoj estas preparitaj por enketi sintenojn, opiniojn kaj kunlaborpretecon de universitatanoj esperantistaj kaj neesperantistaj rilate al la gvidmotivo de la simpozio: “Survoje al virtuala Esperanto-universitato”.

Se vi estas universitatano kaj:

- a) Vi instruas Esperanton kaj/aŭ Interlingvistikon kaj/aŭ Esperantologion, aŭ
- b) Vi instruas aŭ studas en aliaj fakoj (ekz. matematiko, ekonomio, historio), aŭ
- c) Vi esploras pri Esperanto kaj/aŭ Interlingvistiko kaj/aŭ Esperantologio, aŭ
- ĉ) Vi uzas Esperanton ajnmaniere por la eduka kaj/aŭ scienca laboro, aŭ
- d) En la biblioteko de via universitato hejmas libroj en kaj/aŭ pri Esperanto,

vi estas bona respondi la „Demandaron por Esperantistaj Universitatanoj”:

<https://forms.gle/V1hwXXEvCWqPLQmi8>

Samtempe bonvolu prezenti la anglalingvan demandaron „The Relevance of Esperanto in Universities Today”:

<https://forms.gle/qLUvkWGtdz3ERuw7>

al viaj neesperantistaj universitataj kolegoj, amikoj, profesoroj, lektoroj, kaj/aŭ esploristoj. Iliaj respondoj estos gravaj por pli bone kompreni eblon kaj kondiĉojn de akcepto kaj uzado de Esperanto en univesitataj medioj kaj aktivajoj.

Kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, la demando por neesperantistaj universitatanoj jam estos disponebla ankaŭ en kelkaj aliaj lingvoj, krom la angla.

Rezultoj de la enketo estos prezentitaj dum la simpozio. Anticipan dankon pro via kunlaboro por kolekti laŭeble multajn respondojn.

Postsimpoziaj projektoj

La simpozio, sinergie kun kelkaj similcelaj iniciatoj, vigligis laboron pri projektoj rilataj al Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj, traktotaj antaŭ-, dum- kaj precipe post-simpozie. Konsiderata estas ankaŭ la ebleco subvenciigi la projektojn per Erasmus+ kaj aliaj fontoj.

*ILEI-estrarano respondeca pri la simpozio
Radojica PETROVIĆ <radojica.petrovic.rs>*

Anoncoj ...

ILEI prezentas sin

AMO-Seminario 72
Aktivula Maturigo
La 10-an de Aprilo 2021

ilei
Internacia Ligo de
Esperantistaj Instruistoj

ILEI PREZENTAS SIN

- Strukturo kaj celoj de ILEI
- Komunikadkanaloj de la Ligo
- La nova eldono de *Manlibro pri Instruado de Esperanto*
- Preparado de la nunjaraj Kongreso kaj Simpozio

0:03 / 19:58 osjean, Prezidantino Ivan E. Colla

ILEI PREZENTAS SIN AMO 72

179 mektekintés • 2021. apr. 12. 23 0 MEGOSZTÁS MENTÉS ...

„ILEI prezentas sin” – estas prezento, kiu okazis la 10-an de aprilo 2021 en Seminario por Aktivula Maturigo AMO-72, kadre de la 8-a Irana Kongreso de Esperanto. La Seminario kaj aliaj prezentoj de tiu tago estas spekteblaj ĉe: <https://youtu.be/RRM91QzRLLo>. Temoj pritraktataj:

- strukturo kaj celoj de ILEI;
- komunikadkanaloj de la Ligo;
- la nova eldono de *Manlibro pri instruado de Esperanto*;

- preparado de la nunjaraj Kongreso kaj Simpozio.

La prezentadon faris Mireille Grosjean kaj Ivan Eidt Colling. La filmo "ILEI prezentas sin" jam estas en la Jutuba ILEI-kanalo, ĉe la adreso: <https://youtu.be/q-jh3KoP5IU>. Ni dankas al Aristophio Alves Filho, kiu tre rapide alŝutis la filmon en nian kanalon.

Kanto de la Koloroj

Mi volas informi vin, ke nun la vortoj kaj bildoj de la „Kanto de la Koloroj” denove estas haveblaj rete ĉe <<https://icxlm.org/koloro.pdf>>, kaj tuta retejo de „Infanoj ĉirkaŭ la Mondo” estas havebla rete ĉe <<https://icxlm.org>>.



Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj infanoj ĉie lernos kaj povos kunkanti la kanton "Kanto de la Koloroj," aparte la lastan strofon verkitan de Charlotte Kohrs kiu estas:

*„Sur la Tero, bela Tero
Loĝas ni, kantas ni,
Kune sur la Tero,
Monda familio,
Famili', famili'."*

Ronald GLOSSOP en Usono

Du libroj el Pollando

Ni ĝoje anoncas, ke aperis la du libroj el la elektitaj kaj prilaboritaj materialoj de la 5a Interlingvistika Simpozio en la nova eldonserio „Cross-linguistic and Cross-cultural Studies” de la Etnolingvistika Instituto de AMU (Poznano, PL):

1. The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej (2020)
2. The Intercultural Role of Esperanto / Interkultura rolo de Esperanto / Międzykulturowa rola esperanta (2021)

Ili estas troveblaj kaj elŝuteblaj en la retejo de la Eldonejo RYS: <https://wydawnictworys.com/category/nowosci>

Kelkaj prelegoj de la simpozio rigardeblas en la Youtube-kanalo de la simpozio <https://www.youtube.com/playlist?list=PLGDNhxSrlMB-AHJnJumSq9k7Vvnf93Uf>

La unua lernolibro de la Interlingvistikaj Studoj: la **Interlingvistiko** de Věra Barandovská-Frank, elŝuteblas el la retejo de la Studoj

Ilona KOUTNY, Ida STRIA kaj Michael FARRIS (redaktintoj)

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo. Estrare: Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la repaĝon de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj **40 € kaj por B-landanoj 22,50 €**. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, 4 Edgcomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, amatalena@ukr.net. La revuo estas rete aŭskultebla por vid-handikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2021,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2021.**



Nova studgrupo pri Interlingvistiko startos en septembro 2021 en Poznano, Pollando (vd. p. 29)



